Nº 15

KOMITATO POR SPIRITKLERIGADO
Komiteit voor Geestesontwikkeling
(Antverpeno)

# LA LIBERECO DE KONSCIENCO

## KAJ LA

# TUTMONDA FRAMASONARO

EN FRANCA LINGVO VERKITA DE

**A. SLUYS**

Adjunkt-Grandmajstro de la Granda Oriento de Belgujo
Honora Direktoro de la Brusela urba normala Lernejo
Vicprezidanto de la Instruada Ligo
(Nacia Societo por la defendo de la publika instruado)

ESPERANTA TRADUKO DE

**Francisko DELGARBO**

---

PREZO : 10 CENTIMOJ (4 Sd.)

ANTVERPENO
— 1914 —

16033. — Esperantista Presejo D. HALLET, Charleroi.

**N° 15**

KOMITATO POR SPIRITKLERIGADO
Komiteit voor Geestesontwikkeling
(Antverpeno)

# LA LIBERECO DE KONSCIENCO

KAJ LA

# TUTMONDA FRAMASONARO

EN FRANCA LINGVO VERKITA DE

**A. SLUYS**

Adjunkt-Grandmajstro de la Granda Oriento de Belgujo
Honora Direktoro de la Brusela urba normala Lernejo
Vicprezidanto de la Instruada Ligo
(Nacia Societo por la defendo de la publika instruado)

ESPERANTA TRADUKO DE

**FRANCISKO DELGARBO**

**PREZO : 10 CENTIMOJ (4 Sd.)**

ANTVERPENO
— 1914 —

16033. — Esperantista Presejo D. HALLET, Charleroi.

R.E.
16° R
19913
(15
F
DON
63 02933

# La Libereco de Konscienco kaj la Tutmonda Framasonaro

### 1. — La Libereco de konscienco kaj ĝiaj sekvoj.

La libereco de konscienco estas la plej valorplena akiraĵo de la homa spirito; ĝi estas la kondiĉo por ĝia plivastiĝo kaj de la socia progresado, ĉar sen ĝi, la serĉado de la vero, la starigado de la justeco kaj la praktikado de la vera frateco estas neeblaj.

En sia larĝa senco, ĝi estas la rajto rekonita kaj garantiita de la Konstitucio Ŝtata al ĉiuj regnanoj, por alpreni la doktrinojn religiajn, filozofiajn, politikajn, sociajn, sciencajn, kiujn ili juĝas plej bonaj, por ilin proklami kaj ilin propagandi per la parolo, per la skribo kaj per ĉiuj esprimrimedoj, ne povante esti maltrankviligata de la publika estraro.

Ĝi enhavas evidente ankaŭ la rajton por diskuti kaj kontraŭbatali per parolo kaj preso, la opiniojn kiujn oni ne aliĝas.

La libera ekzameno de ĉiuj demandoj sciencaj, filozofiaj, religiaj, politikaj, sociaj, estas la aplikado de tiu libereco.

La religia libereco estas sekvo de la konscienca libereco : la regnanoj havas la rajton ekzerci la religion, kiu plaĉas al ili aŭ ne ekzerci iun religion: neniu religio povas ĝui specialajn favorojn: ĉiuj devas esti regataj de la komuna rajto.

La fundamenta karaktero de l'moderna Ŝtato estas la laikigo, t. e. la forigo de ĉia religia aŭtoritato en la civila kaj politika fako.

La instrulibereco devenas ankaŭ de la libereco de konscienco. Instruado estas komunikado de konoj, doktrinoj, teorioj, kredoj, opinioj; ĉiu malhelpo leĝa al tiu transdonado estas atenco kontraŭ la konscienca libereco. Sed la instruado organizata de la publika estraro devas esti neŭtra laŭ vidpunkto religia, filozofia, politika, ĉar ĝi devas esti alirebla por ĉiuj: la Ŝtato, ne ekzercante kaj ne protektante iun

religion kaj havante la mision garantii la konsciencan liberecon de ĉiuj, ne povas altrudi en la publikaj lernejoj ian kredon aŭ opinion; ĝi ankaŭ devas malpermesi, ke ĝiaj profesoroj, dum la ekzerco de sia funkcio, faru iun ajn atakon kontraŭ la kredoj kaj opinioj. Tamen tiuj profesoroj devas ĝui, kiel ĉiuj ŝtatanoj, la konsciencan liberecon en ĝia tuteco.

La Ŝtata Konstitucio ne nur devas garantii la liberecon de konscienco al ĉiuj regnanoj, sed aliparte ĝi devas protekti la regnanojn kontraŭ ĉiu perforta ago de aliaj regnanoj, izolitaj aŭ grupiĝintaj, por devigi ilin ekzerci iun religion aŭ havi iun opinion, aŭ alpreni kiun ajn doktrinon.

---

### 2. — Sokrato, suferinto por la libereco de konscienco.

La antikvaj tempoj ne konis la liberecon de konscienco: en Egiptujo, Judeo, Kaldeo, Grekujo, Romo, ĉie, la religio estis publika funkcio de la Ŝtato kaj ĉiu doktrino ne konforma je ĝiaj dogmoj estis krimo punita eĉ per la mortigo.

Sokrato estis kondamnita trinki cikuton, pro tio, ke li malbone opiniis pri la ekzistanta religio kaj malbonigis la junularon per siaj doktrinoj. En Romo, la unuaj kristanoj estis persekutataj tial, ke ili ne aliĝis la Ŝtatan religion.

---

### 3. — La netoleremo de la Roma Eklezio.

La Roma katolika Eklezio neniam akceptis la liberecon de konscienco eĉ ne la toleradon religian aŭ filozofian.

Ciam ĝi malhelpis la laikigon de la publikaj administracioj, la presliberecon, la instruliberecon kaj la religian liberecon. Ciam ĝi proklamis la dian rajton kaj kondamnis la homan rajton. Dum la malnova regado, kiam ĝi ekskomunikis kaj mortkondamnis la herezulojn, ĝi liveris ilin al la civila ekzekutisto, kiu devis plenumi la juĝon. La viktimoj de ĝia netoleremo estis nekalkuleblaj; la historio de la Roma katolika Eklezio estas la martirlisto de la popoloj celantaj la liberecon de konscienco.

---

**4. — La moderna filozofio, patrino de la konscienca libereco.**

Dum la XVIIa jarcento la aŭtoritato de la Roma Eklezio komencis esti kontestata, malŝatata kaj repuŝata. La traktato de Vestfalio (1648) finis la religiajn militojn kaj certigis la laŭleĝan oficialan ekziston de la protestantismo kaj de la Kalvinismo. Tamen la religia libereco nur ekzistis por la princoj, sekve de la proverbo : « *cujus regio, ejus religio* » (1) : oni donis du jarojn da tempo al la alireligiuloj, kiujn la konvertitaj monarkoj volis elpeli el siaj Ŝtatoj. La katolika unueco estis definitive rompita en Eŭropo : estis unua paŝo al la libereco de konscienco.

En Anglujo, la akto de toleremo de 1689 esprimis, ankoraŭ neplene kaj timeme, la volon por organizi la politikan societon laŭ la principo de la religia toleremo. Tiu akto havis gravegan influon : la historiisto Buckle konstatis, ke je la fino de l'XVIIa jarcento, la pastrara influo malpliiĝis en Anglujo laŭ granda proporcio, ĉar oni malpermesis, ke la eklezìuloj okupu publikajn oficojn.

La postulon de la libereco de konscienco oni ŝuldas al la deistaj kaj panteistaj filozofoj de la XVIIa kaj XVIIIa jarcentoj. Spinoza en sia « Tractatus theologico-politicus », aperinta en 1670a en Holando, postulis la unua, ne nur la religian toleremon, sed la rajton esprimi libere la opiniojn. En Anglujo Anthony Collins publikigis en 1712 sian famekonatan « Paroladon pri la penslibereco » (Discours of the free thinking, occasioned by the rise and growth of a sect called Freethinkers) kaj fondis la liberan pensrajton sur la devo por serĉi la veron : « Kiu alia rimedo permesas eltrovi la veron, — li diris, — ol la libera uzado de la penso ? »

Kelkajn jarojn poste, en 1720, alia filozofo Irlanda, John Toland, en sia « Pantheisticon » priskribis asocion de anoj de religio ne apogita sur la aŭtoritato sed sur la prudento, libere pensantaj, parolantaj kaj agantaj, sin deklarantaj malamikoj de ĉiuj tiranuloj « monarkoj » aŭtokrataj, nobeluloj fieraj aŭ kondukantoj ribeligantaj de la po- » polo ». Li proklamis la nenuligeblajn rajtojn de la prudento :

« La prudento estas la vera kaj unua leĝo, ĝi estas la lumo kaj » la heleco de la vivo... Oni ne devas ĵuri laŭ la parolo de iu, eĉ ne » laŭ tiu de Sokrato ; malbenu ni ĉian sciencon de la eklezìuloj. »

(1) Kies regado, ties religio

Ĉiuj pensuloj de la XVIIIa jarcento en Anglujo, Germanujo, Nederlandoj proklamis ĉie, kie ili sukcesis aŭdigi sian voĉon, la autonomecon de la homa konscienco kaj kontraŭbatalis la teokration (1) kiu neis ĝin. Ili pretigis la modernan regnon fonditan sur la nacia estreco kaj la libereco de konscienco kun ĝiaj sekvoj.

---

### 5. — La Angla Framasonaro dum la XVIIa jarcento.

La framasonaro ludis gravan rolon en la movado por la liberigo de la homa spirito. Ĝi estis fondata por havigi rifuĝejon kaj medion de libera klerigado al tiuj, kiuj deziris eviti la subpremon de la religiaj sektoj kaj de la netoleremaj kaj fanatikaj partioj, kaj por praktiki la liberecon, la egalecon kaj la fratecon.

La malnovaj konstitucioj de la gildoj kaj de la societoj de ŝtonhakistoj enhavis : « La framasono devas esti fidela al Dio kaj al la Sankta Eklezio kaj ne povas erari aŭ iĝi herezulo ». La unua konstitucio de la moderna, teoria kaj filozofia framasonaro fondita en Londono en 1723 (2) anstataŭigis tiun regulon mallarĝan per la jena :

« Framasono estas devigata, laŭ sia Ordeno, obei la moralan
» leĝon kaj, se li bone komprenas la arton (3), li estos nek malsprita
» ateisto nek malpia malĉastulo. Sed kvankam en la malnovaj tempoj
» la framasonoj estis devigataj aliĝi la religion de la lando, kie ili
» vivis, oni tamen juĝis ke de nun estos pli konvene, ke ili estu nur
» devigataj aliĝi la religion aprobitan de ĉiuj honestaj homoj kaj kiu
» estas : permesi al ĉiu, ke li havu la opiniojn, kiujn ŝajnas al li la
» plej sanaj kaj la plej prudentaj, opinioj, kiuj povas igi homon bona,
» justa, sincera kaj humana kontraŭ liaj similuloj, de kie ajn ili venas
» aŭ al kiu ajn religio ili aparten. Tiamaniere la framasonaro iĝos
» per tiel bonega principo, la centro de la unuiĝo inter la homoj kaj

---

(1) Estraro kies ministroj estas konsiderataj kiel la ministroj de Dio.

(2) The constitutions of the free-masons, containing the history, charges, regulations, etc., of that most ancient and right worshipful fraternity. For the use of the lodges. Verko de Anderson, revidita de komisiono de 14 fratoj, adoptita la 25an de marto 1722a, prezentita al la Granda loĝio de Londono la 17an de januaro 1723a kaj publikigita la saman jaron.

(3) La arto framasona, ankaŭ nomita « reĝa arto ».

» la sola rimedo por starigi firman amikecon inter la personoj, kiuj » sen ĝi estus restintaj disigitaj. »

Se la deistaj filozofoj, kiuj fondis la modernan framasonaron proklamis la necesecon pri kredo je supera Estaĵo, je kreinta principo, sub la nomo de « Granda Arkitekturisto de l'Universo », ili tamen deklaris « ke la religioj ne plu povas helpi la disigon de la homoj kaj meti ilin la unuj kontraŭ la aliaj kiel ne paciĝeblaj malamikoj ». Ili tiel antaŭiris la leĝaron ekzistantan en ĉiuj landoj, eĉ tiun de Granda Britujo, kie la toleremo ne jam entendiĝis al ĉiuj religioj nek al ĉiuj opinioj.

Ni poste vidos, kial kaj en kiaj cirkonstancoj oni plilarĝigis tiun formulon dum la XIXa jarcento en la franca framasonaro kaj en la modernaj « Grandaj Orientoj », kiuj aliĝis novan formulon pli konforman al la spirito mem de l'fondintoj de la Ordeno.

En la XVIIIa jarcento la anglaj loĝioj rapide iĝis potencaj organizaĵoj de filozofia kaj morala edukado, kaj per siaj inicoj, simboloj, instruoj, la praktikado de la toleremo, ili disvastigis en la profana societo la principon de la libereco de konscienco kaj la progresemajn ideojn.

Sen perfortaj agoj, sen persekutado, ne petante helpon al la ekstera forto, sen blasfemo, sen insultoj al siaj kontraŭuloj, per la nura potenco de la prudento kaj de l'ekzemplo ili pruvis la memstarecon de la homa konscienco, la ekziston de la individua, familia kaj socia moralo supera kaj sendependa de ĉiu teologia dogmo. En la loĝioj, per la frata kunlaboro de ĉiuj « homoj liberaj kaj bonmoraj », estis pretigita la epoko de libereco, kiu devas sekvi la longan periodon de subpremado de l'konscienco.

La adeptoj de la renovigitaj loĝioj plimultiĝis eksterordinare rapide: dum dudeko da jaroj, gravega nombro da laborejoj fondiĝis ne nur en Anglujo, sed ankaŭ en la diversaj landoj de la Kontinento. Cie ilin aliĝis la inteligentaj homoj, kiuj volas idealan socion apogitan sur la libereco, la egaleco kaj la frateco. La framasonaro, ne liberigante siajn adeptojn de iliaj devoj al la patrolando, instruis ilin pri la devoj al la homaro kaj predikis la fratecon inter la homoj kaj inter la popoloj (1).

---

(1) E. Nys. Idées modernes. Droit international et Franc-Maçonnerie. Bruxelles. Librairie française et internationale, 1908.

### 6. — La Franca framasonaro en la XVIIIa jarcento.

La « Deklaracio pri la Rajtoj de la Homo kaj de la Civitano » de 1789 estis la faraĵo de la framasonaro: la filozofoj de l'Enciklopedio, kiuj ĝin preparis per siaj laboroj, estis preskaŭ ĉiuj membroj de l'institucio. Antaŭe, sub la influo de la sama fluo de ideoj, la libereco de konscienco praktikiĝis en la puraj demokratioj kiuj iĝis la Unuigitaj Ŝtatoj, kaj la konstitucio de la federacia respubliko sekvis tiun principon ,malpermesante al la Kongreso fari iun leĝon kiu starigus ŝtatan religion, aŭ kiu malpermesus la liberan praktikadon de religio, aŭ kiu limigus la liberecon de la parolo kaj de la preso. Tio estis la transporto de la fundamentaj principoj framasonaj en la profanan mondon.Okazis la samo en Francujo en 1789a kaj de tiam en ĉiuj landoj, kiuj neniigis la dian rajton por ĝin anstataŭi per la homa rajto aŭ la nacia superegeco. La regulo 10a de la Deklaracio de 1789 proklamis :

« Neniu povas estis maltrankviligata pro siaj opinioj, eĉ reli-
» giaj, se nur ilia manifestado ne malhelpas la publikan ordon leĝe
» starigitan. »

Kaj la regulo 11a aldonis:

« La libera komunikado de la pensoj kaj opinioj estas unu el la
» plej gravaj rajtoj de l'homo. Ĉiu regnano povas do paroli, skribi
» kaj presi libere, sed li estas responda pri la trouzo de tiu libereco
» en la okazoj difinitaj per la leĝo. »

Estis la triumfa fino de la multcentjara batalado de la plej famaj pensuloj en ĉiuj landoj, kontraŭ la tiraneco de ĉiuj netoleremaj sektoj, kiuj pretendis posedi la absolutan veron kaj la rajton ĝin altrudi al la konscienco, eĉ perforte.

### 7. — La papaj ekskomunikoj kontraŭ la framasonoj.

La Roma Eklezio ĉiam dediĉis al la framasonaro malamon, kiu sin montris per multnombraj ekskomunikoj. La tialojn de ĉi tio la angla revuo « The masonic magazine » klarigis antaŭ trideko da jaroj: « La kaŭzo de la malamikeco de Romo kuŝas en la fakto ke la libereco kaj la egaleco ĉiam superregis inter la framasonoj, en la tendenco de la framasonismo por kuraĝigi la amon al la scienco kaj la serĉadon de la vero, en la leĝo de bonfarado, en la klopodoj por kunigi por komuna celo la homojn apartenantajn al malsamaj religioj, fine en ĝia rezigno de senkora kaj nur forma religio (1).

(1) E. Nys. Op. cit. p. 45.

Ni devas aldoni ke la framasonaro en ĉiuj landoj estas institucio esence laika, ke ĝi proklamas la liberecon de konscienco, la sendependecon de la moralo de ĉiu religio kaj la superecon de la homa prudento. Nu, tiuj principoj kontraŭstaras absolute la dogmaron de la Roma katolika Eklezio.

Papo Klemento XII publikigis la 28an de aprilo 1738a la papan decidon « In eminenti » malpermesantan al la katolikoj partopreni en la framasonaro kaj frapantan la neobeantojn per ekskomuniko ; la kardinalo-Sekretario Ŝtata, konigis la 14an de julio 1739a, ke tiu ordonletero estis interpretota tiele, ke ĝi malpermesas al la framasonoj kunveni kie ajn, *je puno de morto* (1).

Benedikto XIV, per la papa letero « Providas » de la 10a de majo 1751a, renovigis tiun kondamnon, tial ke la framasonajn kunvenojn ĉeestas personoj de diversaj religioj kaj tial ke la Framasonismo estas sekreta. Li forgesis ke dum la unuaj jarcentoj la kristanismo estis kaŝata kaj persekutata.

La plimulto de la Papoj, Pio VII, Leono XII, Pio VIII, Gregorio XVI, Pio IX kaj Leono XIII, renovigis la malpermeson de Klemento XII kaj Benedikto XIV.

Tiuj kondamnoj ne estis nur teoriaj: « En la reĝlandoj de Du-Sicilioj, en Hispanujo kaj Portugalujo, la framasonaro estis diversfoje kruele persekutata. En 1740a Hispanajn framasonojn oni sendis al la punlaborejo; en 1825a ankoraŭ, sep loĝianoj de Grenado estis ĵetitaj en malliberejon, piede katenitaj; post mallonga proceso, oni kondamnis ilin morti per pendigo ». En Portugalujo la fraton Johanon Boustos ,oni sendis al la punlaborejo, en 1743a, kaj la Angla regnestraro devis sin intermeti por lin savi; en la sama lando severaj persekutoj estis faritaj en 1776 (2).

---

**8. — La netoleremo de la nuntempa Roma Eklezio.**

La Roma Eklezio ne ŝanĝis sian dogmaron kaj se ŝtiparoj kaj eŝafodoj ne plu estas starigitaj por pereigi tiujn kiuj ne akceptas ĝian « Kredon », ni tion ŝuldas al la triumfo de la framasonaj principoj mem, kiujn oni enskribis en la konstitucion de la modernaj regnoj, al la tolerema spirito kiu, unue ekzercita en la loĝioj, penetris en la

---

(1) En Francujo la publikigo de tiu papa letero estis malpermesita.
(2) E. Nys. Op. cit. p. 47.

tutan socialan korpon, escepte en la Roman Eklezion, kiu restas tia kia ĝi ĉiam estis, absolute netolerema kaj fanatika. Ĝiaj aŭtoritataj teologiistoj instruigas eĉ nuntempe ke *nur ĝi* posedas la absolutan veron kaj ke ĝi havas la rajton puni, eĉ permorte, la herezulojn. En libro titolita : « De stabilite et progresus dogmatis » (1), verko aprobita de la Papo, la patro Lépicier (profesoro teologia en la kolegio Sta Urbano de Romo, konsilanto de la kongregacioj, ano de la papa konsilantaro por biblio-studado kaj de la komitato por la leĝarigo de la kanona rajto) proklamas la jenajn tezojn, konformajn al la Eklezia dogmaro (2) :

« Se la herezuloj, libere iĝintaj herezaj, ekzercas publike sian
» herezon kaj ekscitas la aliajn per sia ekzemplo kaj per sia malboniga
» prudento por akceptigi la samajn erarojn, neniu povas dubi ke ili
» meritas esti eksigataj el la Eklezio per la ekskomuniko kaj esti for-
» prenataj per la morto el la mezo de l'vivuloj.

» La Eklezio povas mem juĝi pri nefideleco kaj povas mem de-
» cidi la mortpunon sed ĝi ne povas ĝin ekzekuti ; ĝi komisias pri tio
» la laikan brakon.

» Absolute parolante, oni ne povas nei ke la Eklezio mem rajtas
» puni per la morto la herezulojn eĉ pentantajn.

» La herezuloj kaj la apostatoj povas esti rekondukataj perforte
» al la fido.

» Tiuj kiuj posedis kaj ekzercis la veran fidon devas esti deviga-
» taj, eĉ korpe, por plenumi siajn promesojn kaj tion kion ili iam
» entreprenis.

» La infanoj, kvankam ili estas baptitaj sen sia propra volo, estas
» devigataj, de kiam ili havas la uzon de sia prudento, por vivi laŭ la
» katolika fido, tial ke ne ekzistas alia rimedo por atingi la eternan
» vivon, eĉ, absolute parolante, ili povas esti devigataj, laŭ la jam
» montrita maniero por vivi laŭ la katolika fido. »

Tiu abomene fanatika doktrino, kiu ribeligas ĉiun serenan konsciencon, kovris la mondon je sango kaj ruinoj dum jarcentoj : ĝi estas ankoraŭ instruigata de la Eklezio. Ĝi ne nur celas la puran herezon

---

(1) Pri la daŭrebleco kaj progreso de la dogmo.

(2) Ni citas laŭ la artikolo de E. Doumergue « La Spirito de la Vatikano » en la revuo « Fido kaj Vivo » (« Foi et Vie »). Parizo.

sed ĉian opinion eĉ politikan, kontraŭan al la proponoj de la « Syllabus » (1), kiu kondamnas la fundamentajn principojn de la modernaj Ŝtatoj: la religian liberecon, la presan liberecon, la instruan liberecon, la liberan ekzamenon, la apartigon de la Ŝtato kaj Eklezio, la sendependecon de la civila potenco, la toleremon religian aŭ filozofian.

La Eklezio ne akceptas la toleremon religian aŭ filozofian: « Oni ne toleras », diras S-ro H. Rutten, nuntempa episkopo de Lieĝo, en sia « Kristana Apologetiko », « oni ne toleras tion kio estas bona, vera kaj laŭleĝa, oni nur toleras tion kio estas malbona, falsa kaj maljusta. La katolika instruado akceptas la liberecon de tiu toleremo, nomita civila, kiam ĝi celas havigi pli grandan bonon aŭ eviti pli grandan malbonon. »

Tiu civila toleremo estas do tre malfirma kaj provizora: tie, kie la Eklezio superregas kaj direktas la registaron, ĝi ne toleras la herezon, ĝi pereigas la herezulojn aŭ forpelas ilin el la Ŝtato, kiel ĝi faris dum jarcentoj kaj eĉ meze de la XIXa jarcento en la Papaj ŝtatoj, en la Respubliko de l'Ekvatoro, aliloke ankaŭ, kaj kiel ĝi farus ĉie, kie ĝi sukcesus repreni la politikan direktadon. La teologiistoj instruas ja ke la cedoj de l'Eklezio, rilate al civila toleremo, ĉesas se, anstataŭ akcepti la religian liberecon kiel fakton, kiel okazan socialan necesajon, « la konstitucio pretendas ĝin starigi kiel principon kaj ĝin for- » muli kiel naturan rajton neforpreneblan. »

Ekzistas do kontraŭeco inter la instruado de la Roma katolika Eklezio kaj la fundamentoj de la moderna socio.

La danĝero de la dogmaro de la Roma Eklezio konsistas en la fakto ke en ĉiuj landoj, kie ĝi sukcesis konservi sufiĉe grandan nombron da fideluloj, ĝi kreis en la XIX jarcento, politikan partion, kiun ĝi direktas kaj kiu celas la restarigon de l'malnova regado, kiu subpremis la konsciencojn, kiu pezis sur la homaro dum pli ol mil jaroj, kaj kaŭzis en ĉiuj landoj tiom da doloro kaj ruinoj.

---

(1) La « Syllabus » estis publikigita de Pio, sekve de la papa letero « Quanta Cura » la 5an de decembro 1864a. La anatemoj, kiujn ĝi elparolas kontraŭ « la ĉefaj eraroj de nia epoko » estas ĝis nun ne ĉesigitaj kaj estas ĉiam la substanco de la Eklezia instruado. Antaŭe, Gregorio XVI, en sia letero « Mirari vos » de la 15a de aŭgusto 1832, kondamnis la apartigon de la Ŝtato kaj Eklezio kaj la opinion ke ĉiu povas libere juĝi pri religia temo, ke ĉiu nur dependas de sia propra konscienco kaj povas publikigi tion kion li pensas.

Tio klarigas la akrecon de la kontraŭklerikala batalado en ĉiuj latinaj landoj. La Germanaj kaj Anglo-Saksonaj landoj rompis la rilatojn kun Romo en la XVIa jarcento, kaj la katolikoj, kiuj tie estas nur la malplimulto, estas senpotencaj por superigi tie la politikan dogmaron de la Roma Eklezio. La samo ne okazas tie kie la plimulto restis katolika.La batalo por akiri aŭ por konservi la liberecon de konscienco kaj ĝiajn sekvojn devas do esti daŭrigata senhalte, senripoze, ĉar la ekzisto mem de la civilizacio de tio dependas.

Tiu batalado estas devo, kiun la framasonaro ne povus forĵeti neperfidante sian rolon.

Kaj ĝi plenumis tiun devon, ĝi plenumos ĝin ĉiam en la landoj, kie la Roma Eklezio minacas la modernajn liberecojn. Kaj tio estas precipe la fakto en la latinaj landoj.

---

### 9. — La Franca framasonaro kaj la deismo en la XIXa jarcento.

En Francujo la framasonaro daŭrigis logike kaj energie la efektivigon de sia idealo por liberigo de la homa konscienco. En 1869 la Kongreso de la Orientaj Loĝioj ekzamenis la proponon: forigi el la regularo de la Granda-Oriento la formulon, kiu starigis kiel fundamenton de la Ordeno la kredon al la ekzisto de Dio kaj al la senmorteco de l'animo. La malamikoj de la framasonaro pretendis, kaj bonfide iuj framasonoj tion kredis, ke oni volis kontraŭmeti al la dogmaro deista la dogmaron ateistan. La novan tekston oni aprobis la 14an de septembro 1877 en la granda kunveno de Parizo: ĝi iĝis la unua artikolo de konstitucio de la Granda Oriento en Francujo, en jena formo :

« La framasonaro, institucio esence filantropa, filozofia kaj pro-
» gresema, celas la serĉadon al la vero, la studon de la moralo, kaj la
» praktikadon de la solidareco. Ĝi laboras por la plibonigo materia
» kaj morala, por la perfektigo intelekta kaj socia de l'homaro.

» Ĝiaj principoj estas la toleremo reciproka, la respekto por la
» aliaj kaj por si mem, la plena libereco de konscienco.

» Konsiderante la elpensojn metafizikajn kiel apartenantajn nur
» al la fako de la individua opinio, ĝi forĵetas ĉiun dogman certigon. »

La motivoj de tiu ŝanĝo de la primitiva teksto estis ofte klarigitaj

kaj estas nerefuteblaj. Blatin, de la Granda Oriento de Francujo, klarigis ilin en la framasona tutmonda konferenco, en Antverpeno, la 22an de julio 1894, kaj en la internacia kongreso framasona en Parizo, la 31an de aŭgusto 1900; li diris:

« Oni ofte kulpigis nin, ke ni malrespektis la tradiciojn toleremajn de la ordeno, kiam ni forigis de la kromloko de niaj templo
» la malnovan devizon de niaj patroj: « Je la gloro de la Granda
» Arkitekturisto de l'Universo ». Nu, ni respondas kun precizeco,
» kiun vi certe ŝatos, ke, male, ni pretendas ke ni subtenis pli ol iam
» nian tradician flagon, forigante tiun formulon. La sama spirito, kiu
» gvidis niajn patrojn, kiam ili akceptis la nomon de la Granda Arki-
» tekturisto, nin gvidis kiam ni forigis ĝin.

» Ekzistis ja, dum la lastaj jarcentoj en la mondo filozofia kva-
» zaŭ nur deistoj en tre diversaj formoj. Kolektante ĉiujn sub komu-
» na standardo, la Granda Arkitekturisto iĝis tiamaniere la supera
» nomo de toleremo.

» La tagon, kiam la naturalistaj, pozitivistaj kaj ateistaj principoj
» ekhavis pli gravan parton en la filozofia fako, ne plu sufiĉis la mal-
» nova formulo de la Granda Arkitekturisto: ĝi iĝis eĉ formulo de
» eksigo, standardo de netoleremo, kies malapero ŝajnis altrudi sin al
» ni, je la nomo mem de ĉiuj tradicioj de l'Ordeno.

» Vi do vidas, miaj fratoj, — kaj ni tion ree proklamas tre laŭte,
» por ke nur tiuj, kiuj ne volas aŭdi, nin ne aŭdu — la forigo de la
» frazo « Je la gloro de la Granda Arkitekturisto » neniam estis nea
» ago. Gi estis, male, grava jesa ago, certiganta nian toleramon, nian
» respekton de la libereco de konscienco de ĉiuj.

» Cu ni ne rajtas demandi... ĉu la framasonaj potencoj, kiuj tro-
» vas en tiu ago motivon por rompi, ne precize malrespektas la plej
» ŝatatajn tradiciojn de l'Ordeno, kaj ĉu ili mem ne alportas la plej
» bedaŭrindajn malhelpilojn al la triumfo de l'ideoj, por kiuj ili havis
» la devon batali, kune kun ni?

» Kiuj ajn estas la vortoj, kiujn ni enskribas sur niajn standar-
» dojn aŭ sur la fasadon de niaj temploj, vortoj necese ŝanĝeblaj laŭ
» la epokoj kaj medioj en kiuj ni agadas, ni tamen havas la honoron,
» ni tion ne forgesu, alporti al la profana mondo la grandan moralan
» ideon solidarecan, kiu, ekster ĉiu religia formulo, apogitan sur
» pripensita altruismo, ordonas al ĉiu liajn devojn kontraŭ la aliaj,
» kontraŭ la naturo kaj kontraŭ si mem.

» Vi estas ano de l'homaro, ĝi diras al ĉiu el ni, la prospero de
» la homaro estas via prospero, ĝia sufero estas via sufero. Tio kio
» estas bona aŭ malbona por ĝi, estas ankaŭ tia por vi mem, la feliĉa
» homaro estas via paradizo, la suferanta homaro estas via infero.

» Estas tiu moralo, tiel superanta la religiajn moralojn instruat-
» ajn ĉirkaŭ ni, kaj pravigantajn tiom la malamindaj maljustaĵoj, kiun
» ni devas peni ĉien disvastigi, ĉar ĝi estas destinita por iĝi la granda
» direktanta moralo de la societoj. » (1).

Tiu deklaracio devas fini la malkompreniĝon kiu disigis la framasonaron. Tiuj kiuj fondis nian Ordenon volis forigi el la loĝioj la religiajn kaj politikajn disputojn. Enkondukante en la loĝiojn disputojn metafizikajn, eksigante homojn honestajn kaj liberajn pro iliaj filozofiaj konvinkoj, oni malrespektus la fundamentan regulon. La « stulta » ateisto de la konstitucio de 1723a, ne estis, ne povis esti la pensulo kiu formulas scienca'n konkludojn, la filozofo kiu, pripensante pri la naturo kaj la homaro, esprimas libere la rezulton de siaj meditadoj kaj kiujn la adeptoj de l'dioj, kiujn ili detruas, pensas hontigi nomante ilin ateistoj; ne, Anderson kaj la komisiistaro kiu alprenis tiun formulon, celis forigi de l'Ordeno nur la diboĉulon, kiu, en sia cerba mizero, atencas sian konsciencon, neante tion, kio timigas lin (2).

La filozofia fundamento de la toleremo kaj de la libereco de konscienco, kiun la filozofoj de la XVIIIa jarcento trovis en la principo de l'egaleco de la rajtoj kaj en la respekto al la homa persono, certiĝis dum la XIXa jarcento per la akcepto de la rilateco de niaj pozitivaj konoj. Ni ne povas elpaŝi la kampon de tio kio estas observebla kaj niaj certigoj neniam estas absolutaj veraĵoj. Ni do havas la devon toleri la opiniojn de aliaj, ĉar ni havas neniun rajton pri la penso de alia. « Ne
» agu kontraŭ la aliaj homoj kvazaŭ vi konus la fundon de la aĵoj kaj
» la fundon de la homo. Ne pretendu esti absoluta potenco, t. e. Dio:
» estaĵo, kiu ne posedas la absolutan sciencon, ne praktiku la absolu-
» tecon », diris Alfred Fouillée. Kaj Guyau esprimis la saman penson

---

(1) Framasona kongreso internacia 1900. Protokolo de la kongresaj kunvenoj. 31an de aŭgusto, 1-2an de septembro 1900. Parizo, Generala Sekretariejo de la Granda Oriento de Francujo, 16. rue Cadet (1901). Paĝoj 31 et 32.

(2) P. Tempels. Les Francs-Maçons. Bruxelles. Librairie européenne 1888, p. 28.

per jenaj vortoj: « Ekzistas pli solida fundamento de la toleremo, kiu
» pli kaj pli akceptiĝas laŭmezure de la malapero de la dogma fido :
» estas la malfido pri la homa penso, kaj eĉ pri la volo, kiuj eĉ ne
» estas liberaj sin ne trompi kaj de kiuj ĉiu absoluta fidregulo necese
» estas ankaŭ erarregulo. »

Neniu metafizika, filozofia, scienca dogmo ekparalizu aŭ malhelpu la laboron de la tutmonda framasonaro : La religia dogmigo produktis la halton de l'klerigado de la homaro kaj kaŭzis neesprimeblajn suferojn al la popoloj, kiujn ĝi regadis.La framasonismo fondiĝis por regigi fratecon inter la homoj, per la respekto de ĉiuj opinioj.

Gi ne starigas altaron kontraŭ la altaroj : estante kosmopolita kaj progresema institucio celanta la serĉadon de la vero kaj la plibonigon de la homaro, ĝi estas apogita sur la libereco kaj la toleremo, ĝi ne esprimas nek alvokas iun dogmon. (1).

---

**10. — La Framasonaro kaj la Judoj.**

La framasonaro devis batali kontraŭ antaŭjuĝoj firme enradikiĝintaj en la konscienco de l'popoloj per la jarcenta ago de kulturo dogmiga. Dum multaj jarcentoj ĉi tiuj naskis kontraŭ la judoj la malamon kaj la koleron de la kristanoj, kiuj dum la mezepoko ofte montris sin per teruraj mortigadoj, kiujn la Roma Eklezio en la XIXa jarcento daŭrigas glori per publikaj religiaj procesioj, kiel tiu de la Sakramento de l'mirakloj, kiu ĉiujare malhonoras la stratojn en Bruselo.

En la XVIIIa jarcento, la antaŭjuĝo kontraŭ la judoj estis ankoraŭ tre forta kaj la framasonaro ne malfermis la pordon de siaj temploj al ili.Sed en la XIXa jarcento,ĉie aŭdiĝis protestoj kontraŭ tiu ostracismo nerespektanta la principojn de la Ordeno. En 1845 la granda loĝio de Berlino « Zur Freundschaft » (La Amikeco), rifuzinte akcepti kiel vizitantojn, judajn fratojn, kiuj havis regulajn diplomojn de angiaj loĝioj, la grafo De Zetland portis la demandon antaŭ la granda loĝio de Anglujo. Dudek jarojn poste, la temo estis esplorata de la Germana framasonaro :«la interŝanĝo de opinioj,kiu okazis pri tiu temo havis ĉi

---

(1) Generalaj reguloj de la Granda Oriento en Belgiando. Paĝo 18 de tiu broŝuro.

» tion bonan ke ĝi heligis la demandon kaj farigis gravan paŝon al la
» solvo : multaj grandaj loĝioj germanaj, kiel la granda loĝio eklek-
» tika en Frankfurt s/M. kaj la granda loĝio « Zur Sonne » (La Suno)
» en Bayreuth, revenis al la grandaj principoj de la framasonaro, kiuj
» ne malpermesas la akcepton de nekristanoj. La grandaj loĝioj « Zu
» dem drei Weltkügeln » (La tri globoj) kaj « Royal York Zur Freund-
» schaft » en Berlino informigis la loĝiojn de sia obeo,ke ili nur ekza-
» menu la atestojn de bonkonduto, donitajn al la fratoj de la loĝioj,
» ne informante sin pri ilia religio (1).

**11. — La framasonaro kaj la rasoj.**

La demando pri la akcepto de homoj apartenantaj al aliaj rasoj ol la Ariena raso, ankaŭ leviĝis ĉe la framasonaro. La antaŭjuĝo pri la raso estis kontraŭbatalata de la framasonoj: en 1775, la predikanto Prince Hall fondis en Boston la « African Lodge » (Afrikan loĝion), kiu konsistis el liberaj negroj, kaj li akceptigis la sekvantan jaron, « ke la negroj liberaj povos enviciĝi en la armeon de la revolucio por la sendependeco (2). »

La 8an de julio 1869 la « Granda Oriento » de Francujo faris jenan principdeklaracion:

« La framasonoj de la obeo de la Granda Oriento de Francujo,
» reprezentataj de siaj laŭleĝaj delegitoj en kunveno de 5869a dekla-
» ras ke la homaro kaj la framasonaro estas ofendataj, kiam la koloro,
» la raso aŭ la religio sufiĉas por rifuzi la eniron de profano en la
» framasonan familion. »

La 8an de junio 1873 estis proklamata en Bayreuth, dum la kunveno de la konfederaciitaj Ĉefloĝioj de Germanujo, ke « la diferenco de raso kaj koloro ne povas esti malhelpo al la inico. »

La demando estas do solvita: la enirebleco en la framasonaron devas esti universala, sen distingo pro raso, religio aŭ filozofia opinio. La nuraj necesaj kondiĉoj estas: esti libera kaj bonmora homo, kapabla kompreni kaj praktiki la fundamentajn principojn de la Ordeno.

(1) E. Nys. Op. cit. Paĝo 98 et 99. Citoj laŭ Findel.
(2) E. Nys. Op. cit. Paĝo 44 et 45.

Pro la klaraj deklaracioj, kiujn ni ĵus citis, dubo pri tiu temo do ne plu povas ekzisti.

---

### 12. — La Framasonaro kaj la politiko.

La framasonismo estis, estas kaj devas resti la ligilo frata kaj universala, kiu celas la plibonigon de ĉiuj siaj membroj kaj de la homaro.

Ĝi libere esploras ĉiujn demandojn sciencajn, filozofiajn, religiajn, politikajn, kiuj, laŭ la epoko kaj la loko, interesas la membrojn de la loĝioj. Sed ĝi decidas pri neniu demando per voĉdono, liganta la membrojn. Kiel korpuso ĝi malpermesas al si ĉiun ajn eksteran politikan agadon, sed ĝi lasas al siaj membroj plenan liberecon por agi en la profana homaro laŭ sia konscienco, rilate al la politiko ; ĝi al ili ne donas iun ordonon.

Tiel en Belglando, kiel en Francujo, kiel aliloke ankaŭ, la framasonoj detenas sin en la loĝioj, de ĉiu diskutado pri la okazaĵoj de la publika vivo, pri la elektoj; sed ili libere esploras kaj diskutas la demandojn sciencajn, filozofiajn, religiajn, politikajn. Okazas evidente ke la tiel klarigitaj demandoj estas precize tiuj, kiuj samtempe priokupas la publikan opinion. Sed tio, kio distingas la laboron framasonan estas ke la loĝio mem ne altrudas difinitan solvon, ĝi lasas al siaj membroj plej larĝan liberecon en la profana mondo.

---

### 13. — La defendo de la libereco de konscienco.

Tamen, ĝi ne plenumus siajn devojn, se ĝi ne persiste kaj energie defendus la fundamentan principon, la ekzistkaŭzon de si mem, t. e. la liberecon de konscienco. Ĝi tion konstante faras per siaj inicoj, siaj paroloj, siaj diskutoj. Ĝi inspiras en siajn membrojn la viran decidon por praktiki tiun liberecon en la profana mondo, por kontraŭbatali la netoleremon kaj la fanatikecon, por defendi tiujn, kiuj estas viktimoj de la subpremado, por labori senĉese, ĉiu en sia agadkampo por obteni tiun liberecon se ĝi ne ekzistas en la Ŝtato, por ĝia defendo, se, ekzistanta en la konstitucio, ĝi estas minacata de reakcia partio,

kaj por ĝin disvastigi tiamaniere ke ĝi estu nedetruebla kaj ĉiam pli bonfara.

En la katolikaj landoj, la framasonoj suferas persekuton de la Roma ekleziularo ĝis en la paco familia; tiu ekleziularo subfosas eĉ la fundamenton de la Ŝtato, de la naciaj institucioj per sia instruado, per la gazetaro de ĝi inspirata, per ĉiuj rimedoj de subaĉeto kaj subpremado kiujn ĝi posedas: sia aŭtoritateco, la riĉajoj kolektitaj de la monaĥoj, apogo de potenca partio kiun ĝi ekscitas kaj estras. En Belglando tiu partio sukcesis kapti la politikan potencon kaj uzas ĝin por sia premado, kontraŭ la intereso de la blindiĝinta nacio kaj kontraŭ la supera intereso de la civilizado.

Ĉu la devo de la framasonaro ne estas labori senlace kaj senripoze por la defendo de la moderna Ŝtato, de la libereco de konscienco, kontraŭ tiu vasta konspiro reakcia, kontraŭ tiu reiro al la barbareco?

Ĝi neniam malatentis tiun taskon; ĝi neniam malatentos!

Kiam ĝi komprenigas per siaj inicoj, sia instruado, siaj simboloj, ke la plej granda trezoro de la vivo estas la libereco de konscienco, akirita per la klopodoj de la sinsekvaj generacioj kaj precipe per tiuj de la framasonaro, ĝi kuraĝigas tiujn, kiujn povus trafi la timo por danĝeroj kiuj ilin minacas, kaj ĝi instigas la fratojn al fervora laboro por la defendo de la tiel malfacile konkiritaj liberecoj.

En Francujo la sama batalo sin altrudis al la framasonoj: ne dependis de ili ke ĝi ne ekkomencis.

La Roma Eklezio kondamnis la principojn de la Revolucio kaj ĝi ĉion eblan faris por ilin detrui.

La Framasonaro defendis ilin kun senlaca energio, ĉar ili estas ĝiaj propraj principoj, kaj tiel agante, ĝi plenumis sian devon. Per sia instruado, per sia senĉesa kaj venkiga agado, ĝi potence helpis haltigi la reakcion kaj konservi netuŝitaj la Rajtojn de l'Homo kaj de la Civitano, starigitajn de la Framasonaro de la XVIIIa jarcento.

Kiu do, en la tuta mondo, ne gratulus ĝin kaj sin mem pro tio?

---

#### 14. — La Belga Framasonaro en la XIXa jarcento.

En 1871a, la Granda Oriento de Belgujo, reviziis la ĝeneralan regularon de la Framasona Ordeno kaj difinis la celon kaj karakteron de ĉi tiu per jenaj frazoj:

# NOTO

La tutnove naskita Loĝio "**Esperanto**" plezure konsentis patroni tiun esperantan eldonon de broŝuro, en kiu la historio de la *Libereco de Konscienco* kaj de *Framasonaro* tute intermiksiĝas.

Montri kiel ĉefa estis la agado de Framasonaro por havigi al ĉiuj homoj tiun akirajon de la modernaj spiritoj, tion ni tute aprobas.

Sed forgeso grava ekzistas en tiu verketo : **Laŭ nia** Frato A. Sluys, la tuta Framasonaro franca ŝajnas **konsisti** nur de la Loĝioj federaciitaj sub ĝenerala titolo « *Granda Oriento de Francujo* » (franca rito).

Ni **pensas, ke ĝi estas nevola eraro, kaj tamen oni ne devas forgesi ke, krom tiuj Loĝioj, ekzistas en Francujo pli ol 140 aliaj Loĝioj kunigitaj en la Federacio nomita « Granda Loĝio de Francujo »** (skota rito). (1)

La Loĝio « *Esperanto* », kies multaj anoj estas **samtempe anoj de Loĝioj** de la Franca Rito, **rajtas kaj devas atentigi pri tiuj faktoj.**

**Kvankam** oni povas **aserti, ke la ĝenerala spirito de ambaŭ federacioj estas sama, ke ili havas tute samajn principojn ; kvankam, de longe frate kunigitaj, ili iradas per sama vojo al celoj samaj, notinda** estis la ekzisto de la **Granda Loĝio de Francujo, kies agado kaj** forto estis **grandaj. Ĝi** prezentas la nuran diferencon, ke precize ĝi ankoraŭ kelkfoje uzas la formulon « Je la Gloro de la Granda Arĥitekturisto de Universo ».

---

(1) Ekzistas ankoraŭ en Francujo alia aro de Loĝioj fonditaj de Framasonoj regulaj, sed kiuj havas neniun rilaton nek kun la G.·.L.·.D.·.F.·. nek kun la G.·.O.·.D.·.F.·., pro tio, ke ili enhavas virinojn. Tamen multaj Framasonoj el ambaŭ ritoj vizitas tiujn Loĝiojn.

Tamen, antaŭ proksimume dekdu jaroj, preskaŭ ĉiuj Loĝioj de la G.·.L.·.D.·.F.·. forigis tiun formulon el la *Ritaro ;* sed, por konservi rilatojn regulajn kun kelkaj el la alilandaj Framasonaroj, kiuj konsideras tiun formulon kiel necesan, la *diplomoj* de la tuta Skota Rito en Francujo konservas ĝin, esceptante unu Loĝio.

La Loĝio « *Esperanto* » estis fondata en la Granda Loĝio ĉefe pro tiu *internacia* agadpovo.

Ni tamen devas noti, ke la Grandaj Loĝioj de kelkaj landoj ne ankoraŭ komprenis, ke trudi la akcepton de *dogmo* pri Granda Arhitekturisto (t. e. Dio) estas tute mala je la principoj framasonaj ; kaj jen ekzemplo bedaŭrinda, kiun ni devas citi.

Je la momento de la fondo de nia Loĝio, kelkaj Framasonoj-Esperantistoj de Britujo tuj intencis aniĝi al nia Loĝio supere internacia. Ili ne povis pro tio, ke la G.·.L.·. de Britujo ne permesas, ke ili aliĝu al kiu ajn Loĝio Franca, ĉu de la Granda Oriento, ĉu de la Granda Loĝio, pro nia famekonata kaj ĝenerala sendieco.

Tiu sendieco estas ja ne *individua,* sed *ara* ; t. e., ke ni trudas al neniu nek diecon nek sendiecon. Pri tiuj temoj niaj Loĝioj kaj nia agado estas ĝenerale neŭtralaj, kiel klarege kaj utile montris S-ro A. Sluys en tiu broŝuro.

Ni, anoj de la Loĝio « *Esperanto* », decidis diskonigi la esperantan eldonon de tiu Historio de la Libereco de Konscienco, ĉefe ĉar ni esperegas, ke tia teksto disvastigata per Esperanto en landojn britajn utilos iam, por ke kelkaj Grandaj Loĝioj aŭ ĉesu trudi la formulon forlasitan de aliaj aŭ almenaŭ permesu interrilatojn ĝis nun malpermesitajn.

Plie la Loĝio « *Esperanto* », profunde fidela al la spirito de Framasonaro kaj al Esperantismo, estas feliĉa konigi helpante la publikigadon de la jena verketo, kiaj verece estas la principoj framasonaj kaj kiel ili havas profundan parencecon kun la « Interna Ideo » de Esperanto.

LA LOĜIO "ESPERANTO".

*
*   *

Por unu fojon plie pruvi tion, ni represas ĉi-sube la Principan Deklaron de la Granda Loĝio de Francujo :

La Framasonaro estas universa ligo bazita sur *solidareco*. — En ĉiuj okazoj la Framasonoj ŝuldas inter si *helpon* kaj *protekton*, eĉ riskante sian vivon.

Framasono devas ĉiam memori, ke ĉiu homo, eĉ ne Framasono, estas lia frato.

La Framasonaro havas kiel celon la *moralan perfektigon de Homaro ;* kiel rimedon, la *konstantan plibonigon de ĝia situacio materia kaj spirita.*

La Framasonaro havas kiel devizon : *Libereco, Egaleco, Frateco.*

Ĝi estas la praktika lernejo, la templo de instruado de tiuj tri principoj fundamentaj de ĉiu asocio de homoj, volanta *justecon* kaj *progreson.*

Ĝi alvokas ĉiujn sagacajn spiritojn, ĉiujn honestajn volojn, kiuj sentas bezonon kuniĝi por labori al la perfektigo spirita kaj morala de Homaro.

Sekve, la Framasonaro akceptas, inter siaj adeptoj, neniun diferencigon de nacieco, raso, kredo, opinio, riĉeco, rango kaj situacio. Ĝi postulas nur esti *sinceraj* serĉante la *veron,* kaj profunde sindonaj por la bono de siaj samuloj.

La framasonaj Temploj estas uzataj por la praktiko de supera vivo, al kiu la profanaro devas esti grade preparita.

La Framasonaro tiel preparas labore ĉiujn progresojn kaj certigas la sukceson de ĉiu *liberiga elvolviĝado.*

Ĝi estas lernejo, en kiu devas formiĝi homoj plej bonaj, saĝuloj kaj pensuloj kapablaj klerigi siajn fratojn. Sekve la Framasonoj penadas komprenigi al ĉiu lian intereson. Ili lernigas al homoj sin *ami, helpi* kaj *interligi* por vivi laŭ *perfekta harmonio.*

*Taŭge pensi, diri, fari ; serĉadi la veron ;* lerni en la Temploj la praktikon de la ideoj de *Libereco, Egaleco* kaj *Frateco* por ilin realigi en la profana vivo ; helpi al la progreso de Homaro per la historia lernado de ĉiuj gravaj demandoj sociaj kaj moralaj, per la framasona propagando, per la skribajoj kaj libroj, tiaj estas la devoj ordonataj de la Framasonaro al ĉiuj siaj anoj.

La Framasonaro proklamas tiel la principojn de *universa moralo,* propra al ĉiuj popoloj kaj uzebla en ĉiuj kondiĉoj.

Ĝi trudas neniun limon en la *serĉado de la vero ;* kaj

precize, por garantii al ĉiuj tiun ***kompletan liberecon de pensado*** en ĉiuj direktoj de la spirito, ĝi malpermesas al si formuli dogmojn aŭ postuli je siaj adeptoj fiksitan kredon.

La Framasonaro ne povas adeptiĝi al kiu ajn partio aŭ doktrinaro. Ĝi altiĝas super ĉiujn diskutojn por prezenti al ĉiuj amikoj de la Vero lokon de interkonsento kaj frata unuiĝo.

Ĝi ordonas al ĉiuj siaj adeptoj, kiel *Ŝtatano* kaj *Framasono*, obei la leĝaron de la lando, kie ili rajtas kunveni libere, kaj esti pretaj al ĉiuj oferoj bezonataj de la patrujo.

Ĉiu Framasono estas esence homo *libera*, kiu dependas nur de sia konscienco.

Celante en ĉiuj aferoj la *interkonsenton*, la Framasonoj evitas inter si ĉion, kio disigas la spiritojn, kaj serĉadas tion, kio *kunligas* la korojn.

Ili uzadas la toleremon plej larĝan kontraŭ la opinioj, tiel en la filozofiaj kaj religiaj demandoj, kiel en la aferoj politikaj kaj sociaj.

Ili konsideras la *devon labori* kiel necesegan leĝon de la Homaro kaj malpermesas al si la *memvolan nelaborecon*.

La Framasonoj kunigas sin, formante liberajn asociojn nomatajn *Loĝioj*.

Centra Presejo Esperantista V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.